

Flandra ESPERANTISTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN - PROPAGANDA

Verschiĝint maandelijks
Achtthende jaargang
Nummer 10 (208)
OCTOBER 1951

Vertegenwoordiger in Nederland:
L E E N
sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.
postrek. 34563 van P. M. Mablesone
Pythagorasstr. 122, Amsterdam O.

Orgaan van de
VLAAMSE ESPERANTISTENBOND
POSTBUS 342, BRUSSEL
Postrekening 2321.50 van V. E. B.
Van Heurckstraat 7, Antwerpen

LIDGELDEN:
* Leden: 75 fr.
* Steunleden: min. 150 fr.
Inwonende leden: 25 fr.
(* met bondsorgaan

ABONNEMENTEN:
België: 60 fr.
Ceteraj landoj: 75 bfr.
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

NI LABORU!

La laborsezono komencigis! Estas urĝe necese, ne nur fari laboron, sed organizi ĝin tiel, ke ĝi plej multe efikos. Ankaŭ ĉe esperantistoj en ĉiu grupo kutime estas nur kelkaj, kiuj prenas sur sin ĉiujn taskojn farotajn. Ili faras la internan administran laboron, organizas kunvenojn por anoj kaj ne-anoj, faras propagandon, verkas artikolojn kaj gvidas kursojn.

Ofte estas necese, ke tiuj kelkaj personoj faru ĉion, ĉar mankas la bonaj helpantoj, sed same ofte la lokaj aŭ landaj funkciuloj estas tiel fervoraj, ke aliaj esperantistoj simple ne havas ŝancon kunlabori. Fervoro estas laŭdinda; laboro estas meritplena, sed *laborigado* estas pli fruktodona. La pasinteco pruvis, ke en preskaŭ ĉiu loko estas troveblaj helpaj fortoj, se oni bezonas ilin por iu difinita kaj speciala celo.

Sperta organizanto devas profiti tiun fakton. Se sub bona gvidado multaj faras iun taskon, ne nur la laborkvanto pliiĝas, sed oni aktivigas grandan parton de la membraro. Estas biologia leĝo, ke muskoloj, kiujn oni ne uzas, malfortiĝas kaj atrofiĝas. Pro la sama kaŭzo nia movado perdas membrojn, ĉar ni ne uzis iliajn fortojn. Aktivaj membroj ne forkuras; tial estas necese, aktivigi ĉiujn. Kompreneble iliaj kapabloj ne estas egalaj, sed sperta organizanto scias elekti taskojn, konformajn al la povoj kaj scioj de la anoj. Ni gvidu Esperanto-societon kiel komercan entreprenon: ankaŭ tie estas relative nur malmultaj, kiuj disponas pri eksterordinaraj kapabloj; tamen ĉiu laboras kaj kontribuas al la profito de la entrepreno.

Kompreneble la komerca entrepreno havas la avantaĝon, ke en ĝi oni povas libere elekti siajn kunlaborantojn dum ke en societo oni devas akcepti ĉiujn, kiuj deziras aliĝi. Tial ofte en malgrandaj grupoj mankas bonaj organizantoj. Sed se ne mankas la bona volo, eĉ tiam solvo estas trovebla, se oni petas helpojn de najbara sekcio aŭ de la ĉefestraro.

Ĝis nun la esperantistoj kaj sekcioj tro multe devis labori memstare. Estonte ili trovu la kuragon entrepreni propagandan laboron kun helpo de aliaj. Ili konsciigu pri la fakto, ke gravas ne nur la loka aktiveco, sed ke la movado povas flori kaj kreski nur, se ĝi kreskas kaj floras ĉie. Tio postulas helpojn precipe tie, kie nia movado estas relative malforta kaj helpojn oni donu ankaŭ ekster la limoj de la urbo, regiono aŭ lando kaj krome trans la limoj, kiuj ekzistas inter la diverstendencaj Esperanto-organizoj. Ni pripensu, ke asocioj esperantistaj, kiuj per Esperanto strebas al specialaj celoj, povos sukcese labori nur, se ni kune firmigos la bazon de unu komuna Esperanto-fronto.

H. J. B.

PRAKTIKA METODO

(El: Franca Esperantisto).

Ofte la gazetaro alportas al ni la eĥojn de novaj klopodoj por antaŭenpuŝi la progresojn de nia lingvo. Sindonemaj amikoj havas ideojn kaj celas akiri la helpojn de la samideanaro por ties realigo. Planoj ne mankas: gravaj novaj gazetoj en Esperanto, utilaj eldonaĵoj, turismaj entreprenoj, komercaj aferoj, propagandaj metodoj, k.t.p. Sed ve! Kiom da tiaj streboj mortas en sia junaĝo, kelkfoje antaŭ ekmarŝo! Kial? Oni ne povas konstrui sur sablo kaj nur per ideoj. Por klarigi tion, ni ekzamenu ĵus faritan proponon, kiu venas el najbara lando kaj estas diskutita dum la Universala Kongreso. Ĉar la elspezoj por la eldono de landa Esp. gazeto estas tro grandaj kaj formangas ofte la tutan monon kolektitan de la landa organizo, oni proponis la eldonon de komuna plurlanda gazeto, kun po unu respektiva landa parto kaj unu internacia parto, konsistanta el artikoloj literaturaj, klerigaj, sciencaj, k.t.p. kune kun ĝenerala informaro. La plano tekstas, ke en ĉiu lando oni elektu redaktoron por oficialaj informoj;

UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

MÜNCHEN

4-11 AŬG. 1951

Ĉar detalaj raportoj pri la Universala Kongreso de Esperanto jam aperis kaj parte ankoraŭ aperos en „Heroldo de Esperanto“ kaj „Esperanto“, ni nur telegramstile pritraktos la kongresarangojn.

Partoprenis la kongreson proks. 1800 personoj el kiuj la plimulto jam ĉeestis la interkonatigan vesperon, kiu okazis sabaton la 4-an de aŭgusto en la fama bierejo „Hofbräuhaus“. La ejo estis plenstopta pro la fakto ke krom esperantistoj ĉeestis multaj ne-esperantistoj. Cetera brua orkestro malebligis la interparoladojn, do ne mirige, ke la interkonatigo grandparte fiaskis. Dimanĉmatene en la moderna salonego de „Deutsches Museum“ okazis la solena malfermo. Prezidis la vic-prezidanto de U.E.A., d-ro P. Kempeneers, kiu dankis d-ron S. Ziegler kaj la aliajn kunlaborantojn de la L.K.K. pro la granda prepara laboro kaj poste donis al multaj reprezentantoj la okazon transdoni salutojn. Por L.E.E.N. salutis s-ro W. Böttcher, por F.L.E.E. s-ro F. Couwenberg. La festparoladon faris d-ro E. Privat. Samvespere okazis en „Auditorium Maximum“ sub rektoreco de prof. d-ro H. Sirk la inaŭguro de la somera universitato, kiu en la daŭro de la jaroj fariĝis elstara arango en la kongresprogramo pro la altnivelaj prelegoj de fakuloj kaj scienculoj. Okazis jenaj prelegoj: „Juraj kaj jurmedicinaj problemoj pri eŭtanazio“ (prof. G. Canuto); „La ideologia dramo de L. Zamenhof“ (prof. G. Waringhien); „Tollitoj kaj Gandhi“ (d-ro E. Privat); „Fundamentaj elementoj de federacia ŝtato“ (prof. d-ro I. Lapenna); „Esperanto kaj mondivilizo“ (prof. L. Laurat); „Giuseppe Verdi“ (d-ro V. Musella); „Klamaniere oni povas determini la nombron de la molekuloj“ (d-ro H. Sirk) kaj „La idea mondo de A. Strindberg“ (K. Söderberg). Same kiel en Parizo, la laboroj de la kongreso estis plenumataj en kvar sekcioj, kies prezidantoj raportis en la ĝenerala kunveno

vendredon la 10-an de aŭg. La sekcioj pritraktis sun prezido resp. de d-ro Kennedy, prof. Lapenna, prof. Laurat kaj s-ro Petit jenajn temojn: Esperanto en la edukado de plenkreskuloj; Esperanto en scienco kaj tekniko; Esperanto en la internaciaj intelektaj intersanĝoj; Esperanto en la internacia trafiko kaj komerco. Mardon la 7-an de aŭg. okazis la inaŭguro de „Esperanto-Platz“ en ĉesto de la vic-urbestro de München. Ssmvespere okazis la kongresa balo kun amuzaj prezentadoj en Hofbräuhaus. Merkredon okazis i.a. belarta kaj oratoria konkurso kaj arta vespero, en kies programo i.a. kunlaboris profesiaj kantistoj, orkestro kaj kanthoro. En la skeĉoj i.a. aktorin nia fama humoristo Raymond Schwartz. Jaŭdon la 9-an de aŭg. okazis tuttaga ekskurso al Lago de Starnberg. Bedaŭrinde la konstante falanta pluvo ege provis la humoron de la ekskursantoj. Vespere s-ro Th. Wimmer, la urbestro de München akceptis la komitatanojn de U.E.A. kaj kelkajn aliajn gastojn. En la ĝenerala kunveno, kiu okazis vendredon, raportis la prezidantoj de la kvar sekcioj. Oni akceptis plialtigon de la kotizoj de U.E.A. por la jaro 1952. En la ferma kunsido, kiu okazis sabaton la 11-an de aŭg. d-ro Kennedy raportis pri la fakaj kunsidoj kaj prof. Canuto pri la laboroj de la komitato de U.E.A. La kongreso aprobis jenan deklaron:

La celo de la Esperanto-movado estas plena apliko de la internacia lingvo Esperanto en ĉiuj aferoj de la internacia vivo kaj por ĉiuj internaciaj rilatoj.

El tia vasta uzado de la internacia lingvo logike rezultas:

1. altiro de pli larĝaj popoltavoloj al aktiva partopreno en la internacia vivo;
2. progresigo de la scienco kaj plimultigo de la intelektaj intersanĝoj en internacia kadro;
3. plifirmigo de tuthoma solidareco kaj rapidigo de la unueco de la homaro.

ANTVERPENO, URBO DE NIA KONGRESO

MUZEO PLANTIN-MORETUS

La domo Plantin nun estas tute renovigita post la bombenŝalo sur la vendredan placon je 2 Januaro 1945. Unika en la mondo, ĝi donas ege kompletan rigardon super la produktojn de la libropresarto de la unua tempo post ĝia eltrovigo. Ni trovas en ĝi manuskriptojn, presprovaĵojn, inkunablojn, miniaturojn, kupro- kaj ligno-gravuraĵojn kaj krome la unuajn uzitajn presilojn. Ege interesataj ni promenas tra la riĉega biblioteko, la literfandejo, la butikoj, la ĉambro de Justus Lipsius kaj aliaj kaj povas admiri ne malpli ol 15



Muzeo Plantin-Moretus; interna korto (Antverpena prop. servo)

familioportretojn majstre pentritajn de Rubens. La interna korto, pri kiu ni prezentas bildon, estas juvelo de la 16-jarcenta arkitekturo. Ĝis en la 19-a jarcento la familio de la Moretus-oj daŭrigis la laboron komencitan de Kristoforo Plantin en 1549. En 1876 la urbo aĉetis de Grafo Moretus la domon kaj laborejon por 1.200.000 fr. kaj instalis ilin kiel muzeon. Tiu domo kun ĉio kion ĝi entenas estas unu el la plej interesaj monumentoj, kiujn la flandra renesanca kulturo postlasis en Antverpeno.

Cirkaŭ Plantin, la franca tipografisto, disvolvigis tre granda parto de la historio de la Humanismo en la Nederlandoj kaj en okcidenta Eŭropo.

H. Vermuyten.

Wereldnieuws

In Portugal, waar Esperanto nu weer is toegestaan is de Portugese Esperanto-Bond heropgericht. Ook in Mexico is een Esperanto-vereniging opgericht.

Er zijn de laatste maanden weer verschillende folders en gidsjes in Esperanto verschenen, o.a. van Bonn, Bratislava, Stockholm en München.

Op de Parijse jaarbeurs was dit jaar evenals vorige jaren een speciale Esperanto-stand ingericht.

In de Volkshogeschool Hustedt bij Celle (Neder-Saksen) wordt van 24 September tot 5 October opnieuw een speciale Esperanto-cursus voor onderwijzers gegeven.

Ter gelegenheid van het Wereldcongres van Esperantisten te München, waaraan door ongeveer 1800 esperantisten werd deelgenomen, ontving een plein in het centrum van de stad de naam Esperanto-plein.

In Belo Horizonte, de hoofdstad van Minas Gerais (Brazilië) werd een monument onthuld ter nagedachtenis van dr. L. Zamenhof.

In Denemarken worden aan verschillende avondschole Esperanto-cursussen gegeven. Het rijk salarieert de cursusleiders, terwijl de gemeenten voor gratis leslokalen moeten zorgen.

In Parijs hebben professoren en geleerden van naam o.a. dr. G. Waringhien, dr. I. Lapenna en dr. L. Laurat een werkgroep van esperantisten-academici opgericht met het doel het gebruik van Esperanto te propageren in kringen van studenten en intellectuelen en de toepassing van Esperanto in de wetenschap te bevorderen.

In Polen bestaat momenteel in een tiental steden een Esperanto- of Zamenhofstraat.

In Engeland werd aan 1300 leerlingen van verschillende inrichtingen van onderwijs Esperanto onderwezen, meestal in de gewone schooluren.

Bij een in IJsland gehouden opinieonderzoek sprak ruim 72 pct. van de bevolking zich uit ten gunste van Esperanto.

INTERNACIA KUNVENO T.J.O.

De la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto okazis en Haarlem la 7-a internacia junularkunveno de T.J.O. Partoprenis proks. 300 personoj el 12 diversaj landoj.

Vendredvespere la eks-prezidanto s-ro C. Geurts malfermis la kunvenon kaj donis post mallonga enkonduko la parolon al la diversaj landaj reprezentantoj, kiuj transdonis salutojn kaj bondezirojn. La oficiala bonvenigo de la urbestro, kiu okazis sabatmatene, estis samtage disaŭdigata de V.A.R.A. La programo menciis diversajn ekskursojn, i.a. al Alkmaar (fromaĝfoiro), Edam, Volendam kaj Amsterdam, kiuj pro la bonega vetero plene sukcesis. En la laborkunsido oni elektis novan estraron, kiu nun konsistas el jenaj personoj: T. Kanter (Ned.), prezidanto; f-ino H. Veldhuyzen (Ned.), sekretariino; G. de Vries (Ned.), kasisto; K. Meyer (Germ.), asosoro; M. Duc Goninaz (Franc.), asosoro kaj f-ino N. Kool, redaktorino. La junularo mem prizorgis la vesperajn programojn, escepte je sabato, kiam prelegis s-ino J. Isbrücker kaj s-ro A. Cseh. Neforgeblaj estas la idiotaj de jugoslavo „Ali Baba“ kaj la spritaĵoj de la franco Daniel, kiu per sia aparato aŭdigis la voĉojn de diversaj konataj esperantistoj. Bonega estis la prelego de Henny de Ketelaere kaj ĝuinda la kantado de la anglaj kaj germanaj partoprenintoj. Tro rapide pasis ĉi tiu semajno de internacia kuneŝtado, en kiu multaj ligiloj de amikeco estiĝis aŭ plifortikigis.

T. K.

R. Watier, ĝen. sekr. de U.E.F.

OBSERVOJ

NEFIDINDAJ ZELOTĴOJ.



En la ferma solenaĵo de „la plej granda junulrenkontigo de ĉiuj tempoj” okazinta dum aŭgusto en Orient-Berlino, orient-germana ofici-alulo deklaris i.a., ke nur tiuj kiuj nun lernas la rusan lingvon

poste kapablos igi „intelektuloj laŭ formato de la venontaj tempoj”.

Kiom da fojoj mi aŭdis similtajn en la pasintaj dek jaroj, ĉiŝoje favore al alia „mondkonkeronta” lingvo? Kaj se mi estus aŭskultinta iliajn tro flamajn zelotojn, mi jam estus devinta ŝanĝi almenaŭ tri fojojn en tiu periodo la objekton de mia lingvostudado.

Povas esti, ke neniam mi igos intelektulo „laŭ formato de la venontaj tempoj”, sed spite la asertojn de tiuj diverstendencaj profetoj mi tenis kaj tenas min je la neŭtrala, nekonkerema kaj vere demokrata Esperanto.

Pik.

LA STUDANTO

Uitwerking van de opgaven in het vorige nummer:

Maljuna komercisto, kiu estis mortonta, venigis sian plej karan amikon kaj diris al li: „Parencojn mi ne havas, Jen, en tiu malnova kofro kuŝas mia tuta havaĵo: kvarmil guldenoj. Mi akiris ĝin kun peno kaj decidis doni al vi la duonon, kondiĉe ke la alian duonon vi metu en mian tombon.” Tre plaĉis al la amiko la unua parto de la testamento, sed la duan li ne ŝatis. Li klopodis atingi, ke la mortonto ŝangu sian decidon, sed vane. Tial li fine solene promesis plenumi lian deziron. Post la morto de la komercisto li rakontis la rimarkindan fakton al konato, kiu demandis: „Ĉu vi efektive plenumis tiun deziron?” „Kompreneble, mi ja solene promesis.” „Nu, tion mi ne estus farinta. Mi estus domaĝinta la monon.” „Jes, ankaŭ mi ĝin domaĝis kaj fine mi trovis la ĝustan solvon. Anstataŭ la mono(n) mi metis ĉekon de dumil guldenoj en lian tombon.”

La premion „La mondo ne havas aŭtendejon” en la verkaj-konkurso de la somera numero gajnis s-ro M.E. Nawijn el Hago pro sia sublima (sed neniel sub-lima!) esejo pri „Nederlanda Esperantisto”.

Korektu ĉi suban leteron:

Via tre interesa letero, en kio vi rakontis tiom pri vian landon, mi hierau ricevis. Mi tutkora dankas pri la belajn bildojn, montrante via popolo kaj pejzaĝoj. Jam tiuj bildoj montras, ke en via lando la klimato estas multe pli varme kaj agrable ol ĉe ni. Estas tre afabla, ke vi invitas min veni al vin en la venantan libertempon. Ho, se mi nur estus riĉa, kiom volonte mi vojaĝis tie! Sed bedaŭrinde mi ne estas riĉa kaj ne povas trovas la mono por la vojaĝo, kio ja estas tre multekosta. Jam tri monatoj mi estas sen laboron kaj estas tre malfacila trovi novan oficon. Post multajn jarojn mi eble havos sufiĉe monon por rigardi la sunon, brilanta en via hejmlando.

LA FUNEBRA IRADO

(DE UITVAART)

Guido Gezelle

Ekruĝiĝas veturilo lante tra l' silenta strato, kaj sub blanka ĉarkovrilo ploro obtuzas kaj veado.

Paŝ-post-paŝe preterpasas mutmalĝoje l' ĉevalpar, kaj kunsenton vidi lasas per kapturnoj oftaj, ĉar

mastro diris ĉi-matene, dum prizorgo kaj kombado, al amataj gravmine la novaĵon pri ĉi bat'!

„Baj' li diris, „Baj' kaj Bleso, he, kvietu - kun malĝaj' iros al funebra meso ni kun ĉaro, Bles' kaj Baj'!”

Kaj post tremp' de mano sia en sanktakvon klaran, plu benas li per gesto pia senatentajn kapojn du,

krucas, kisas ilin, diras: „Bles' kaj Baj' vi al tombej' knn mortint' konduke iras, Baj' kaj Bles', kvietu, hej!”

ŝaŭmus vi kaj ŝvitus ĝene nesciantaj pri l' solen', kaj vi varmegiĝus plene se mi lasus vin sen ben'!”

Kaj li mem sin krucas, benas, antaŭ l' kapto en la brid', per sanktakvo, kiun tenas ujo ĉe la kruda lit'.

Ĉar li dormas ĉe l' bestparo, ĝin prizorgas ja kun am', pli fidele ol zorgfaro de l' patrino al infan'.

Li aspergas per buksero stalon kaj ĉevalojn, por ke malbeno kaj danĝero restu de l' funebro for.

Kiu ne l' danĝerojn konas, minacantajn al la vir' kun ĉevaloj, -ja pli bonas-mastroj liaj, dum vojir'?

Kaj la ĉaro rulveturas lante, triste tra la strato, kaj sub la kovril' murmuris plendoj ploraj kaj ĝemad'.

Paŝ-post-paŝe l' paro pasas, per kaptur' al kondukist' la kompaton vidi lasas, paŝ-post-paŝe kaj kun trist'.

trad. H. Vermuyten.

MIA VOJO

Ĉi sube ni publikigas la bildojn de unu el la kartoj de Hans Bakker el la serio „Mia Vojo”. Vidu la recenzon en rubriko „Bibliografio” sur paĝo 4-a de ĉi tiu numero.

KOMUNIKOJ DE LA LIBRO-SERVOJ.

	Glđ.	Belg. Fr.
Morto de Trajno, de Freeman Wills Crofts (een vlot geschreven detective-roman)	5,30	63,—
Murdo en la Orienta Ekspreso, de A. Christie	1,—	16,—
La Knaboj de Paulo-strato, de F. Molnar	1,—	16,—
Princino de Marso, de E. R. Burroughs	1,—	16,—
Sep Vangofrapoj, de K. Aszlanyi	1,90	28,—
La Virineto en Bluo, de Mason Stuttard	1,90	28,—
Kredu min, sinjorino!, de C. Rossetti	5,40	72,—
Miru-Pensu-Ridu, de P. Bennemann	5,40	72,—
La Mondo ne havas atendejon, de M. Dekker	2,50	34,—
Fundamenta Krestomatio, de L. Zamenhof	5,20	72,—
Invito al Ĉielo, de D. Sayers (verlaagde prijs)	3,50	46,—
Esprimo de sentoj en Esperanto, de E. Privat	0,85	12,—
Leteroj de Zamenhof I en II geb. p. deel	8,55	130,—
Plena Vortaro (moet iedere esperantist bezitten)	11,40	175,—
Schildlof's woordenboek Esp. Ned. en Ned. Esp.	2,75	45,—
Leerboek Esperanto, de F. Randi	—	30,—

Voor andere studieboeken, zie uitgebreide lijst in het September-nummer.

MENDU ĈE

Boekendienst L.E.E.N., Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom, (giro 76915)
Vlaams Esperanto-Instituut, Blankenberge steenweg 72, Brugge (p.c.r. 3268.51)

1. Li petis min, lasi (ke mi lasu) lin sola. 2. Li demandis al mi, ĉu mi preferas (pli ŝatas) teon aŭ kafon. 3. Se vi volas sukcese, vi devos studi kiel eble plej diligente. 4. Ĉi tiu paketo pezas ducent gramojn. Mi ne scias, ĉu la alia estas pli ol kvindek gramojn pli peza, ĉar mi ankoraŭ ne pesis ĝin, sed ĝia pezo certe superas ducent kvardek gramojn. 5. Mi ĝojas, ĉar li venos hejmen post tri semajnoj. 6. La antaŭan (pasintan) jaron ni duope faris vojaĝon tra Portugalujo.

1. Dronigi. 2. mirigis, konsternis. 3. rompiginta. 4. konstruigis. 5. ŝprucis. 6. bolos, kuiras. 7. interesigas, interesas. 8. pendigi, eksidi. 9. kortuŝis, emociaj. 10. konvinkas, konvinkiĝas. 11. starigis. 12. scivolas, finiĝos. 13. moviĝis. 14. klopodis, konverti. 15. turnigis. 16. konfuzigas, erarigu, konfuzu. 17. enuigis, tedis. 18. naŭzigis. 19. komenciĝos, rapidi, fini. 20. surpriziĝis. 21. daŭris, daŭrigis. 22. sterniĝis. 23. forblovis, forruliĝis, pendigis. 24. rompigis. 25. ŝanĝiĝema, brulanta, sufokas.

Juĝisto akcentis la gravecon de la juro (akcente atentigis pri la graveco de la juro) kaj diris al la akuzito (kulpigito): „Diru nur tion, pri kio vi estas certa (konvinkita). Mi absolute kredis, ke ĉi-matene mi enpoŝigis mian poŝhorlogon kaj nun tamen evidentiĝas (montriĝas), ke mi lasis ĝin kuŝanta (kuŝi) sur la kameno.

En tiu momento iu foriris de la publika tribunalo. Dudek minutojn poste tiu iu sonorigis ĉe la hejmo de la juĝisto (ĉe la juĝisto hejme) kaj diris, ke li venas por preni la poŝhorlogon, kiun lia juĝista moŝto lasis kuŝanta sur la kameno. La libervola komisiulo (komisiito) ankoraŭ ne retroviĝis.

Copy voor het volgend nummer in-zenden vóór 14 October s.v.p.

Vertaal:

1. Als de zon schijnt, schijnt alles mooier te zijn. 2. Het hoofd van de school kwam binnen met een vuurrood hoofd. 3. Beste kind, dit zijn de beste boeken die ik heb. 4. Bestaan er woorden, die uit meer dan 5 lettergrepen bestaan? 5. Ik heb mijn leven nog niet zo'n leven gehoord. 6. Hij vertrekt morgen vroeg in de morgen. 7. Rijd je liever te paard dan in een auto? 8. Ken je haar man niet, die lange man met een zwart baardje? 9. De oude man verbrandde alle oude documenten. 10. Hij verdient meer, dan hij volgens bekwaamheid verdient.

Vertaal:

Een bediende die een flinke salarisverhoging had gekregen, vierde deze zeldzame gebeurtenis door ontelbare malen op de gezondheid van zijn baas te drinken. Toen hij eindelijk thuis kwam en de trap opgestrompeld was, wilde hij zich verfrissen. De wastafel stond vlak bij het open raam. Met onzekere hand goot hij water in de waskom, doch hij kon niet verhinderen, dat een onverwachte zwenking een flinke straal door het geopende raam deed gaan, juist op het hoofd van een voorbijgaande nachtwaker. „Kun je niet een beetje uitkijken?” brulde deze naar boven, waarop onze vriend terugschreeuwde: „Wat doe je dan ook in mijn waskom.”

Uitwerkingen van Vlaamse cursisten voor 20 Oct. aan V.E.B., Studanto, postbus 342, Brussel; van Nederlandse cursisten aan A.J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Z.

Se vi intencas vojaĝi al Italujo vi aliĝu al Touring Club Italiano. Aliĝiloj kaj dokumentoj haveblaj ĉe la ĝenerala sekretario.

VERDLANDO VOKAS

Listo de radio-disaŭdigoj en aŭ pri Esperanto kaj informoj. Tempindiko laŭ MET (= mezeŭropa tempo) valida ankaŭ en Nederlando kaj Flandrujo.

Mallongigoj: I = informoj, P = parolado (et) o. K = kurso, M = muziko.

Dimanĉe:

19.00-19.15 Sofio, 39,11 m: I.

Lunde:

8.15— 8.30 Stokholmo, 19,80 m, 49,46 m: I
8.45— 9.00 Lille, 235 m: K.I. (post 15/10).
15.30—16.— Rio de Janeiro, 30,71 m, 375 m: K.
16.15—16.30 Stokholmo, 19,80 m, 27,83 m: I
23.15—23.20 Hilversum II, 298 m, VARA: I. (Nur ĉiudusemajne).

Marde:

2.15— 2.30 Stokholmo, 19,80 m, 27,83 m: I
12.55—13.00 Berno, 16,87 m, 31,04 m, 48,66 m: P. de d-ro Arthur Baur
18.35—18.40 Berno, 19,60 m, 31,04 m, 48,66 m: Ripeto de la tagmeza dissendo.
23.15—23.30 Gvatemalo, 49 m: I.

Merkrede:

18.20—18.40 Romo, 25,40 m, 31,35 m: P
22.35—22.40 Vieno, 25,46 m, 513 m: I.

Ĵaŭde:

9.30—9.45 Parizo, 445 m: K.
12.55—1300 Berno, 16,87 m, 31,04 m, 48,66 m: P. de d-ro E. Privat.
18.10—18.25 Vieno, 30 m, 203 m, 25 m, 41 m: P. (ĉiun duan ĵaŭdon).
18.35—18.40 Berno, 19,60 m, 31,04 m, 48,66 m: Ripeto de la tagmeza dissendo.

Vendrede:

18.20—18.40 Romo, 25,40 m, 31,35 m.

Sabate:

21.00—21.15 Sofio, 39,11 m: I.
23.15—23.20 Hilversumo I, KRO, 402 m: I

Kvankam la programo pro spacoman-ko jam kelkfoje ne aperis en ĉi tiu organo, la radio-servo ankoraŭ regule funkcias. Ĝi rilatas kun diversaj radiostacioj kaj dissendas iliajn informojn al la radioprogram-revuoj, kiuj aperigas ilin en siaj kolonoj. Se vi rimarkas, ke tio ne plu okazas, vi bonvolu skribi al la redakcio de la koncerna revuo kaj al ni.

La ĉiutagaj elsendoj de Parizo kaj Prago ne plu okazas. Versajne ni esperantistoj ne sendis sufiĉe da skribaj aplaŭdoj. LA ESPERANTISTOJ JA HAVAS LA ELSENDOJN, KIUJN ILI MERITAS!

Jen kelkaj adresoj:
SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.

Sveriges Radio, Stockholm 7.
Radio Ministerio da Educaçao e Saude, Rio de Janeiro.

La Voz de Centro America Guatemala Cd., C.

Radio Wien, Argentinierstrasse 30a, Wien IV.

Radio Roma, Via Vittorio Veneto 56, Roma.

Bonvolu esprimi vian dankon ankaŭ al la nederlandaj stacioj kaj petu vian radio-uniĝon okazigi venontvintre Esperanto-kurson.

Informojn pri Esperanto-radio-elsendoj sendu ne nur la radio-stacioj, sed ankaŭ la radio-aŭskultantoj al: S. S. de Jong Dzn, Radio-Servo N.C.K.E., Waltaweg 3, Tjerkwerd (Fr.), Nederlando.

DIVERSAĴOJ

Renkontigo por skikurantoj kaj montaramantoj okazos 23/12 1951 - 2/1 1952 en Fontcouverte, Savojo (Franca Alparo). Informojn donas E. Bidoit, instr. C.C., Suippes (Marne), Fr.

Angla esperantisto s-ro Martin H. Dodson, studento ĉe „St. John's College” en Cambridge, okaze de feria vojaĝo tra Nederlando vizitis biciklovenliston en Rotterdam por lui biciklon por la resto de sia vojaĝo. Ĉar li ne komprenis la nederlandan lingvon, li hezite demandis „do you speak English?” „Ne”, estis la respondo, „nur Esperanton!” La afabla butikisto invitis sian klienton gasti ĉe li kaj pruntis al li sian propran biciklon por daŭrigi la vojaĝon al Amsterdam kaj de tie al Germanujo.




In iedlere fabriek is tegenwoordig



een laboratorium waar men probeert



of het niet 1 m.M smaller, of 0,1 cent goedkoper kan



het is wat de klok slaat,



doch de efficiency van de geest wordt verwaarloosd



hoewel de oplossing gereed ligt

NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA”

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst:
 Mr A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, tel. 96160.
 Penningm.: P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O, postrek. 34563.
 Boekendienst, schr. cursus voor gevorderden en dipl. B: H Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom, postrek. 76915.
 Bibliotheek: E. A. Koot, Jon. de Meesterstraat 12, Utrecht.
 Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.
 Alg. Ned. Esp. Examen-comm.: Mej. H. M. Mulder, Zilvermewuustr. 29, Badhoevedorp
 Cefdel. U.E.A.: P. Moen, Schaarsbergenstraat 104, Den Haag, postrek. 79167.

ABONNEMENTSPRIJS

Onze abonné's maken we er opmerkzaam op, dat krachtens besluit van de jaarvergadering 1951 de abonnementsprijs van „Nederlandse Esperantisto” voor 1952 is verhoogd van fl. 2,25 tot fl. 2,50.

Devkonscia L.E.E.N.-anaro,
 Senhezite al posteno!
 Šparu en la nuna jaro
 Por kongres' en Antverpeno!

Post la someraj kursoj en Soesterberg la ĉefestraro danke ricevis de s-ino M.E.R.B.-F. g. 2,50 por la propaganda kaso.

PRELEGANTOJ ATENTU!

Dezirante starigi interesajn programojn por grupkunvenoj, la sekciaj estraroj ofte serĉas taŭgajn prelegantojn, kiuj pretas prelegi en iliaj sekcioj. Ofte la ĝen. sekretario ricevas informojn pri adresoj de spertaj prelegistoj, sed bedaŭrinde li ne posedas ilin. Tamen de tempo al tempo diversaj esperantistoj prelegas en aliaj sekcioj. Pro tio la ĝen. sekretario refoje *urĝe* petas ĉiujn geanojn de L.E.E.N., kiuj pretas kontribui al sukceso de grupvesperoj per prelegoj, kun aŭ sen lumbildoj, sciigi tion al li, samtempe menciante la

temojn de la prelegoj, formaton de event. lumbildoj, daŭron de la prelegoj, la kondiĉojn kaj event. aliajn detalojn.

KRITIKU KAJ SUGESTU!

En la jarkunveno en Hilversum ne aŭdigis kritikoj pri nia organo „Nederlandse Esperantisto”. Tamen ni estas certaj, ke niaj membraj havas dezirojn kaj sugestojn rilate la formaton kaj la enhavon. El Flandrujo ni ricevis detalan raporton kun diversaj kritikoj kaj sugestoj, kiuj certe estas pripensindaj. Ni afable petas la sekciajn estrarojn fari enketon okaze de grupkunveno kaj sendi al ni raporton pri tiu afero, kun respondoj al jenaj demandoj:

1. Ĉu vi deziras pli da Esperantaj artikoloj aŭ pli da nederlandlingvaj aŭ ĉu vi kontentas pri la nuna proporcio inter la du lingvoj?
2. Ĉu la artikoloj ĉefe koncernu nian movadon?
3. Kiujn rubrikojn vi forigus, se vi estus la redaktoro, kaj kiujn vi aldonus?
4. Kiuj rubrikoj estas tro longaj laŭ via opinio kaj kiuj tro mallongaj?
5. Ĉu la nuna formato plaĉas al vi aŭ ĉu vi preferas alian formaton?
6. Kiujn aliajn kritikojn, proponojn, sugestojn, k.t.p. vi havas?

Ĝus aperis la dua eldono de „Esperanta Krestomatio”, kiun ĉiuj A-kandidatoj devas legi. Menu ĝin ĉe la libroservo. Prezo g. 1,95.

PLAATSELIJK NIEUWS

Kapellen: Al ges-roj V. Jurgens-Binnoir, Vloeiende 106, naskiĝis la 29.8.51, kvara infaneto, Gabriella. Sincerajn gratulojn al la gepatroj kaj ĉion bonan al la filineto!

V.E.B. Afdeling Mechelen: Ons programma van September werd normaal en onder ernstige belangstelling afgewikkeld. Voor October werd voorzien: 3/10 Varia Vespero; 10/10 Enigmaj kaj novaĵoj; 17/10 Prelego de s-ro H. Rainson pri „Psikologio”; 24/10 Gramatiko; 31/10 Parol-ekzercoj. In November organiseert onze afdeling een eerste feestje met uitnodiging van de vrienden uit Gent en andere plaatsen. Tevens vangt in October onze cursus, in het kader van de stedelijke avondleergangen ingericht, aan; de lessen vinden iedere Woensdag en Vrijdag plaats van 19 tot 20.30 u. in de school Louisastraat vanaf 10 October. Leider: dr. T. van Gindertaelen. Inschrijving en deelneming kosteloos.

Alkmaar: Begin September werd in Alkmaar een afdeling van L.E.E.N. opgericht met 11 leden. In de eerste bijeenkomst, op 10 Sept., werd het huish. reglement vastgesteld en werd het bestuur gekozen. Er werd besloten iedere week bijeen te komen en het eerste gedeelte van de conversatieavonden aan studie te wijden. Twee van de leden onderwijzen Esperanto aan 51 leerlingen van het 5-e en 6-e leerjaar van een plaatselijke lagere school. Secretaresse van de nieuwe afdeling is mevr. E. Dijkema, Willebrandtstr. 4, Alkmaar. Wij wensen de heer G. Luinge en zijn medewerkers van harte geluk met de geboorte van onze jongste spruit en hopen, dat de nieuwe afdeling spoedig in ledental toe zal nemen.

Bussum: Nia juna sekcio en Naarken-Bussum aranĝos festvesperon sabaton la 27-an de oktobro en hotelo „De Rosenboom”. Bussum kaj invitas la esperantistojn el najbaraj sekcioj ĉeesti. La programo mencias i.a. teatraĵetojn, deklamadon, kantadon de ĥoro, pianludon. Inter la programeroj oni dancos. Informojn donas la sekr.iino s-ino H. J. C. de Boer, Karbouwstr. 31, Bussum.

Den Haag: 4/10 Korekto de la hejmtasko pri la sufikso *ig*; 11/10 S-ino R. Köhler van Ghelder deklamos; 18/10 F-ino J. B. Lehnen rakontos diversajn sciindaĵojn pri bestoj; 25/10 S-ro F. Weeke pritraktos la sufikson *ig*.

Deventer: La 10-an de sept. ni priparolis la laboron farotan kaj decidis denove organizi en kunlaboro kun la Instituto por Popol-Instruado kurson por komencantoj kaj se eble ankaŭ daŭrigan kurson. Ni aranĝos propagandvesperon kun provleciono. Nij

grupvesperoj estonte okazos ĉiujn duan kaj kvaran lundojn; la duan ni pritraktos la studrubrikon de N.E. kaj aliajn ekzercojn kaj la kvaran ni havos t.n. parolantan gazeton.

Groningen: 4/10 S-ino A. Albers-Alberts parolos pri la „tago de la bestoj”; 11/10 kaj 18/10 S-ro J. V. Holleman prelegos pri la komenco de la internacia movado; 25/10 F-ino H. Kiers kondukos nin al iu „Alpenweide”; 1/11 F-ino E. Hovinga rakontos pri la someraj kursoj en Soesterberg.

Hilversum: 4/10 rakonto pri la liberigo de Lejdeno; 11/10 Varia kunveno; kunportu Ned. Esp.; 18/10 S-ro H. Mabesoone montros lumbildojn kaj prelegos pri la arkeologia studenta tendaro sur Bornholm; 25/10 S-ro Pothuyzen rakontos pri legendo de S. Lagerlöf.

Leeuwarden: La 19-an de nov. 1926 fondiĝis la Frisa Esperantista Rondo. Okaze de la 25-a datreveno okazos festa kunveno en Leeuwarden dimanĉon 18/11 1951, al kiu estas invitataj ĉiuj esperantistoj en la nordo. Versajne partoprenos ankaŭ germanaj samideanoj el Bremen. Pliaj detaloj sekvos. Jam nun bone notu la daton!

Rotterdam: La unua postmilita „verda dimanĉo”, aranĝita de la lokaj sekcioj Espero kaj Merkuro bone sukcesis. Krom multaj anoj el Rotterdam ĉeestis esperantistoj el Leiden, Den Haag, Delft kaj Dordrecht. La prelego de s-ro A. J. Kalma pri diversaj organizaj problemoj rezultigis viglan diskutadon. Post komuna kantado pluraj partoprenantoj en la lunepaŭzo faris agrablajn ŝipekskursojn sur „Bergse Plassen”. Posttagmeze oni daŭrigis la programon per oratora konkurso, por kiu sin anoncis neniu, kvankam f-ino H. Veldhuyzen afable funkciis kiel provkuniklino. Sekvis prelego de s-ro Kalma pri Esperanta humoro. Vigla diskuto estiĝis pri la demando, ĉu la venonta sudholanda intersekcia kunveno en Hago okazu sabate aŭ dimanĉe. Prezidis la intersekcian kunvenon s-roj J. Driesen (Espero) kaj J. Telling (Merkuro).

Okaze de gastkoncerto de sveda orkestro el Helsingborg en Rotterdam oni laŭ „Het Vrije Volk” de 21/8 interŝanĝis salutojn inter Nederlando kaj Svedujo. Bedaŭrinde neniu el la svedaj gastoj parolis aŭ komprenis la nederlandan lingvon kaj inverse neniu el la gastigantoj povis kompreni sin en la sveda lingvo. Esperanto tamen alportis la solvon. Du praktikantoj de tiu lingvo trovis unu la alian kaj la afero bone aranĝiĝis...

Flandra Ligo Esperantista.

Postbus 342, Brussel.

Sekretario: G. Maertens, Prins Leopoldstraat 51, Sint-Kruis.
 U.E.A. peranto: Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 4161.35.
 Redakcio F.E.: Dr. T. van Gindertaelen, Louisastr. 23, Mechelen.

ESTRARKUNVENO:

Okazis la 23-an de sept.; ĉi-foje, en Antverpeno, ĉar unu el la ĉefaj priparolitaj punktoj de la tagordo estis la kongreso. La ĉefestraro okazigis apartan kunvenon kun la LKK. Ekde nun niaj Antverpenaj amikoj laborados por inde akcepti la anaron de la du asocioj.

PETO:

Niaj sekcioj certe jam fiksas la laborplanon por la vintro 1951-1952. Sed verŝajne ili trovos ankoraŭ lokon por enŝovi du gravajn punktojn: la propagandon por nia revuo kaj por la 2-a komuna kongreso en Antwerpen. Por la sekcioj kun multaj junaj gemembroj ni rekomendas la sistemon de ŝparkaso, unue por la abonpago kaj poste por la kongreselspezoj.

PROPAGANDO:

Por la propagando ĉe eksterstarantoj nia Instituto disponigas la malgrandan libreton: Esperanto, de Wereldhulptaal, po 0,50 fr.

NI SEMAS JAM NUN!

Sub tiu titolo ni aperigis artikoleon en la julia numero de F.E. Multaj liganoj, verŝajne pro la libertempa atmosfero, hazarde ne rimarkis ĝin! Tial ni ree enpresigas ĝin: Ofte ni konstatas ke en lokoj, kie la

Ligo povus organizi kurson, ni ne disponas pri Esperanto-profesoro. Ĉiuj ligoj kiuj ŝatus doni dum la venonta vintro kurson en loko ne tro malproksima de la loĝloko, bonvolu informi la sekretarion, kaj samtempe sciigi la eventualajn kondiĉojn.

Niaj grupaj kunvenoj estos certe pli interesaj se de tempo al tempo esperantisto el alia loko venos por paroladi. Tial ni insiste petas, ke kapablaj ligoj, kiuj ŝatus paroladi pri iu ajn temo, en iu sekcio aŭ kerno de la Ligo, komuniku al ni la kondiĉojn, la temon kaj la daŭton.

ĈE NIAJ REPRESENTANTOJ:

Nia amiko J. Steegmans, reprezentanto por Overpelt, forlasis nin, t.e. ne nur la Ligon sed ankaŭ la patrolandon por enmigri en Kanadon.

La reprezentanto de Welle, amiko Jozef Houtman, edziĝis la 10-an de julio: duope, la geedzo ankoraŭ pli intense laboros por nia lingvo. Dume, ni kore gratulas.

GELUKWENSEN

Dr. Th. v. Gindertaelen werd benoemd tot substituuat-procureur bij de rechtbank van eerste aanleg te Mechelen. Wij vertolken zeker de mening van alle leden wanneer wij hem in zijn nieuwe loopbaan van magistraat alle voorspoed toewensen.

FOTOJ SOESTERBERG

De 11 fotografintoj mi ricevis entute 152 fotojn pri pli malpli gravaj momentoj de niaj someraj kursoj. Du el ili (de s-ro L. Besbrugge el Gent) vi jam vidis en la septembra numero. Nun la tuta kolekto cirkulas kaj ĉiu kursano siatempe ĝin ricevos. Kvankam ni petis, ke ĉiu admiru ilin maksimume nur du tagojn, la listo estas tiel longa, ke la lastaj devos atendi kelkajn monatojn. Do ne malpacienĉu kaj ne menu fotojn antaŭ ol vi ricevis la plenan kolekton.

C. B. Zondervan.

GAZETARSERVO

Regule ni konstatas, ke tro malmultaj esperantistoj kaptas la okazon, sendi regule informojn al la gazetaro. Bone funkcia gazetarservo estas nepre necesa. Ni denove konsilas al ĉiu sekcia estraro elekti kompetentan membron kiel konstantan prizorganton de la loka gazetarservo. La anoj, kiuj legas novaĵojn kaj informojn pri novaj progresoj en la Esperanta gazetaro, transdonu ilin al la raportisto kiu regule sendu mallongajn kaj aktualajn komunikojn al la redakcioj de la loka gazetaro. Nepre ne forgesu fakajn periodaĵojn, k.t.p. Pere de la delegitoj oni ofte povas ricevi informojn el eksterlando, kiujn fakaj periodaĵoj volonte akceptas. Tiuokaze oni kompreneble aldonu, ke la informoj estas ricevitaj per Esperanto.

37-a Universala Kongreso de Esperanto en Oslo

2 aŭg. - 9 aŭg. 1952

Adreso: Box 942, Oslo.
 Kongreskotizoj ĝis 31/12 1951 kr. 35,—; ĝis 31/3 1952 kr. 40,— kaj poste kr. 45,—; por edzinoj de kongresanoj resp. kr. 17,50; kr. 20,— kaj kr. 22,50 kaj por gejunuloj malpli ol 21-jaraj resp. kr. 11,70; kr. 13,50 kaj kr. 15,—. Individuaj membroj de U.E.A. rajtas dealkali rabaton de kr. 5,—; edzinoj kaj gejunuloj proporcie.

Vojevec Jozc, 41-j. oficisto, Predjamska 78, Ljubljana-Vic, Jugoslavujo, deziras korespondi. Niaj gegrupanoj (medicinaj studentoj, flegistinoj, gimnazianoj k.a.) deziras korespondi kaj interŝanĝi il pk., pm. kaj presajojn pri diversaj temoj kun tutmondaj gesperantistoj kaj kuracistoj. Adreso: Esperanto-Instituto Niigata-Ika-Daigaku, Asahimati-1, Niigata-SI, Japanujo.

CATALOGUS BIBLIOTHEEK L.E.E.N. - SUPPLEMENT

Lectuur voor beginners:		
1246	William	Legolibro Romans, enz.:
1258	P. Bennemann	Miru, pensu, ridu!
1255	A. Bögh-Högsted	Misteroj de l' vivo
1244	A. Daudet	Leteroj el mia muelejo
1238	G. Lindquist	Ferio kun la morto
1253	C. Rossetti	Kredu min, sinjorino!
1254	J. D. Sayers	Invito al ĉielo
1236	R. Stevenson	Diabet' en botel'
Gedichten, enz.		
1260	M. Dekker	La mondo ne havas atendejon
1239	W. Shakespeare	Gajaj edzinoj de Windsor
Wetenschap, enz.		
1258	P. Bennemann	Miru, pensu, ridu!
1252	I.S.A.E.	Scienca Revuo 1949
1256	I.S.A.E.	Scienca Revuo 1950
Economie, enz.:		
1237	A.P.E.	Nuntempa Pollando
1259	B.I.G.S.	Por iu pli bona mondo
1243	C.D.E.L.	Faktoj pri Danlando
1257	M. de Freitas	Tutmondeco kaj Esperanto
1245	C. Hattersley	Maŝinoj, mono kaj paco
Leerboeken voor beginners:		
1261	H.A. Appel	Esperanto-leerboekje I
1242	G.F. Makkink	Esperanto leren lezen
1250	W. Wingen	Esperanto in der Tasche
Leerboeken voor gevorderden:		
1247	P. Neergaard	Fremdvortoj en Esperanto
1251	D. Quarello	Komplementoj de l' verbo
Woordenboeken:		
1248	H.M. Scott	Filatela terminaro
Geschiedenis, enz.:		
181	G. P. de Bruin	Gvidilo-suplemento
Propaganda, enz.:		
1240	N.C.K.E.	Esperanto, de wereldhulptaal

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.

PREMION akiris por VEB, post n-roj 111-112: s-ro C. Meeus, el Antwerpen; kaj por LEEN: f-ino E. Leopold, el Arnhem.

SOLVOJ.

N-ro 113. *Horiz.* 1. artik; maksim. 3. akompan; lukt. 5. M. Sidlovska. 6. teo; rot. 7. ej; ale. 8. Kapitanfilin. 10. persist; kovr. 12. dudek; arbedo. *Vert.* 1. alarm; eksped. 2. ja. 3. trovit; parad. 4. devi. 5. kupolo; trink. 6. da. 7. manovr; nutra. 8. soif. 9. kolekt; inkub. 10. al. 11. inkuj; likvid. 12. aven.

N-ro 114. antaŭtuko; celulo; galimatio; aŭtodafeo; aspiranto; akordiono; supreniri; elektrizi; stacidomo; silkraŭpo; incidento; ŝtupetaro; reakciulo; inventaro; detektivo; ekspansio; rozkolora; antaŭpago; admirinda; kameleono; implicita; ondolongo; murpapiro. Ne aŭskultante, ne kondamn.

N-ro 115: KRUCVORTENIGMO.

Horizontale. 1. fari(R); donace prezenti(R). 2. legomo(R); parenco. 3. nedifina adjektivo; persona pronomo; parto. 4. preciza kono pri iu fako(R); perdinta kapablon uzi membron(R). 5. meritanta(R); krei bildojn en sia spirito(R). 6. malgranda(R); malsevera. 7. skeleto(R); prepozicio. 8. konjunkcio; mezgrada lernejo(R); invito veni. 9. montri(R); deziranta scii(R). 10. plenda ekkrio. 11. batalilo(R); aŭdigi sian malkontenton(R). 12. korpoparto(R); membro(R).

Vertikale. 1. birdo(R); fari kavajon eltirante teron; prepozicio. 2. belforma(R); kalva(R). 3. virina estajo(R); fabela estajo(R). 4. larĝe malfermi la buŝon(R); formularo per kiu oni deklaras ke oni partoprenos(R). 5. inter-

1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
2	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
3	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
4	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
5	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
6	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
7	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
8	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
9	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
10	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
11	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
12	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■

jekcio; arbedo kreskanta en sablaĵoj (R). 6. stimuli(R). 7. fari bildojn per strekoj(R). 8. juvela ŝtono reliefe skulptita(R). 9. forto(R); senpieda besto(R). 10. eligi laŭtajn sonojn(R); manĝaĵo de besta deveno(R). 11. penado por venki kontraŭaĵon(R); portebla plektita ujo. 12. nuligi leĝon(R).

N-ro 116. TROVU

la mankantajn kvinliterajn verbojn en la subaj esprimoj. Nur unu litero estas komuna al la radikoj de ĉiu trio. Tiuj komunaj literoj, legitaj laŭ la donita ordo, formas proverbon.

- ... la ludkartojn antaŭ ol disdoni ilin; ... rendezvuon; ... en la akvon por helpi dronanton.
- ... ŝtonan dormon; ... feron dum ĝi estas varmega; ... la kapon sur la mano.
- ... sian lecionon; doni por ... al birdoj; ... sian vivpanon.
- ... monon ĉe banko; ... fortikajon por ĝin preni; ... al Dio.
- ... antaŭ iu sur piedoj kaj manoj signifas „flategi”; ... lavitan tolaĵon antaŭ ol meti ĝin en ŝrankon; ... la haŭton kiam ĝi jukas.
- ... la tagon antaŭ la vespero; anticipe ... ĉambron en hotelo; ... novan servistinon.
- ... la harojn; ... al si la cerbon por trovi solvon; ... tapiŝon por forpreni la polvon.
- ... kontraŭ la sorto; ... por la patrujo; ... sur la glacio.
- ... la lipojn por ne ridi; ... finlegitan libron; ... per bastono.
- ... siajn harojn per silka tuko; ... la oran bovidon; ... problemon.
- ... bovinon; ... kafon; simie ... iun.
- ... la okazon; ... iun el la okuloj; afable ... la manon al iu.
- ... sekreton; ... kiel korvo; ... kiel najtingalo.
- ... leteron antaŭ ol meti ĝin en koverton; ... ekskurson tra la urbo; aŭdante la novaĵon, li apenaŭ povis ... al siaj oreloj.
- ... ĉapelon sur la kapo; ... en ŝuldoj; sin ... per politiko.

La solvojn sendu la nederlandanoj al S-ro G. J. Teunissen, Burg. Tellegenstr. 21 hs., Amsterdam-Z., kaj Flandra Ligo al Postbus 342 (Enigmoj), Brussel, antaŭ la 20-X-51.

BIBLIOGRAFIO

Recenzoj pri de ni ricevataj verkoj aperas samtempe en „Nederlanda Esperantis'o”, organo de la Nederlanda Esperanto-Asocio „La Estonto Estas Nia” kaj en „Flandra Esperantisto”, organo de „Flandra Ligo Esperantista”. Pro tio ni aperigas recenzojn nur pri tiuj verkoj, kiujn ambaŭ asocioj ricevis. Librojn, ricevatajn de unu el ambaŭ asocioj, ni nur mencias.

Esperanto, de internationale taal voor iedereen: 16-paĝa nederlandlingva propaganda broŝuro de H. W. Alings, eld. de la Asocio de Lab. Esperantistoj F.L.E., Heemstedestr. 44, A'dam. Prezo g. 0,10.

Mia Vojo; serio de 7 ilustritaj propagandaj kartoj, eld. de la L.E.E.N.-propagandisto H. Bakker. Ĉiu karto pere de 6 bildetoj kun subskriboj laŭ sprita maniero atentigas pri Esperanto kiel tempo- kaj monŝpariga solvo de diversaj problemoj. La aŭtoro sendas ĉiun duan tagon unu karton al la direkto de diversaj entreprenoj, bankoj, oficejoj, k.t.p. por konfronti ilin kun tiu solvo Forsendinte la tutan serion, li vizitas ilin por esplori ĉu inter la oficejoj troviĝas esperantistoj. Se jes, li petas pendigi tabuleton „Esperanto parolata”; se ne, li petas la permeson prelegi antaŭ la oficistaro. Imitinda metodo! Propagandistoj povas mendi la kartojn ĉe s-ro H. Bakker, v. Tyll v. Seroosk. pl. 33, I, A'dam, poŝtkonto 151461. Unu serio kostas g. 0,35; fr. 5,—.

New World-Alphabet, Nederlands, de E. C. v. Dissel, eld. Instituut World-Steno, Leeuwarden, prezo g. 1,65.

La prezo de „Kon-Tiki”, recenzita en la antaŭa numero, estas g. 14,50; b.fr. 165.

Karta Enciklopedio kulturhistoriaj bildoj, eld. La Bosketo, Whiteway, Stroud, Glos. (Anglujo). Jam aperis tri serioj el ili, kiuj en poŝtkartformato prezentas interesajn bildojn (kun klarigoj) kaj estas haveblaj ĉe la eldonanto, kontraŭ pago de 2 resp. kuponoj por 4 kartoj, ĉu intersange por materialo por la serioj aŭ bild(kart)oj pri popolaj iloj aŭ kutimoj.

Faldfolio pri la urbo Bonn, plaĉaspekta gvidfolio kun urboplano kaj teksto. Senpage havebla ĉe Städtisches Verkehrsamt, Poststrasse 27/29.

ESPERANTO

IN DE WETENSCHAP

In November 1947 werd de Nederlandse Vereniging voor toepassing van Esperanto in de Wetenschap opgericht, ruim een jaar nadat een bureau van dezelfde naam haar werkzaamheden was begonnen.

De genoemde vereniging is met haar ca. 80 leden een afdeling geworden van de Internacia Sciencia Asocio Esperantista (ISAE) en heeft als zodanig de Esperanto-naam Asocio de Nederlandaj Scienculoj Esperantistaj (ANSE). Ze bezit een Raad van Advies, waarin zitting hebben Prof. Dr C. de Boer (Leiden), Prof. Dr D. van Embden (Amsterdam), Prof. Dr A. F. Holleman (Bloemendaal), Ir J. R. G. Isbrücker (Den Haag), Prof. G. Mannoury (Amsterdam), Prof. Dr M. J. Sirks (Groningen), en Prof. Dr M. Valkhoff (Amsterdam).

ANSE heeft in Groningen en Amsterdam groepjes studenten-leden, waarvan die te Amsterdam zich kortgeleden hebben verenigd tot de Universitara Esperantista Rondo Amsterdama (UE-RA).

De werkzaamheden van ANSE zijn velerlei. Een of twee maal per jaar wordt een bijeenkomst gehouden, waar door de leden in het Esperanto wetenschappelijke voordrachten worden gehouden, die gewoonlijk aanleiding geven tot een levendige discussie, eveneens in het Esperanto. Aldus biedt de vereniging haar leden gelegenheid het Esperanto op wetenschappelijk terrein mondeling te hanteren.

Tot de taak van ANSE behoort ook het verlenen van bemiddeling aan buitenlandse Esperantisten, die enigerlei medewerking wensen van Nederlandse wetenschappelijke instanties. Zo b.v. verzocht Dr Wajsbium (Engeland) voor een historisch onderzoek onze bemiddeling bij het verkrijgen van gegevens uit de collectie Warner van Oosterse manuscripten te Leiden. Zijn onderzoek werd hierdoor zeer belangrijk bevorderd.

Van tijd tot tijd vertaalt ANSE voor leden of buitenstaanders samenvattingen in het Esperanto om toe te voegen aan wetenschappelijke publicaties.

Omdat ANSE deel uitmaakt van de Internacia Sciencia Asocio Esperantista zijn de leden in het bezit van de internationale ledenlijst, waarin de studievakken vermeld zijn, zodat ieder gemakkelijk door middel van Esperanto met collega's contact kan zoeken.

ANSE droeg veel bij tot de uitgave van Sciencia Revuo, een kwartaalblad dat bij Muusses wordt uitgegeven, ten dele als orgaan van ISAE, ten dele als onafhankelijk blad.

Tot de belangrijkste werkzaamheden van ANSE behoort het voeren van propaganda in kringen van intellectuelen. Het gebruik van het woord propaganda is hier echter niet op zijn plaats. Intellectuelen zijn voor de gebruikelijke vormen van propaganda nl: ontoegankelijk. Leuzen en eenzijdige uitspraken prikkelen een kritische geest tot afwijzen; een onverantwoorde of opdringerige wijze van schrijven of optreden valt in deze kringen uit de toon en heeft ten hoogste een averechts resultaat. ANSE bezit enkele brochures en vlugschriften, voor deze kringen bestemd, en deze werden bij verschillende acties verspreid. Zo b.v. werden zij rondgezonden onder de hoofd- en afdelingsbestuurders van de Ned. Chemische Vereniging om een actie van Drs W. P. Roelofs te ondersteunen om te bereiken dat in de vakbladen van deze vereniging Esperanto-samenvattingen worden opgenomen. Dit doel werd tenslotte bereikt. Onder de Amsterdamse hoogleraren werd een actie gevoerd in verband met de benoeming van Mr S. Pragan als assistent in de Roemeense taal en het Esperanto aan de gemeentelijke universiteit.

In 1948 werd ter gelegenheid van de internationale universiteiten-conferentie van UNESCO te Utrecht een drukwerk in de Engelse taal aan de deelnemers rondgezonden en werd een tentoonstelling van Esperanto-literatuur gehouden.

Met enkele personen uit kringen van documentatie werden besprekingen gevoerd om tot het inschakelen van Esperanto te stimuleren. ANSE heeft ook contact gezocht met het Verbond van Wetenschappelijke Onderzoekers en aan 3 personen uit onze vereniging werd gelegenheid gegeven de betekenis van het Esperanto voor de wetenschap toe te lichten.

Hoewel met het bescheiden ledental

(slot onderaan de derde kolom)

Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-Bond Postbus 342 — Brussel en Ned. Esperantisten-Vereniging LEEN, Stadionkade 6 Amsterdam Z. (Ned.) — Drukkerij Krol, Hoofdstraat 31, Uithuizen (Ned.).

INFANOJ DE LA PARADIZO

La plej granda preĝejo de Parizo: Notre Dame, kaj la plej malgranda: Saint Julien des Pauvres, situas unu tuŝ apud la alia. Senspire aŭskultante iun dimanĉon en la tre malgranda preĝejo de Saint Julien, oni aŭdas tontri en la malproksima la orgenon de Notre Dame. Se oni ankoraŭ pli atente aŭskultas, oni aŭdas kanti milojn da birdetoj. Vi sciu, ke inter la du preĝejoj troviĝas la birdofoiro de Parizo.

Ĝi estas malgranda, de maljunaj ulmoj ombrita placo, kie dimanĉe de la sepa matene ĝis vespere je duono post la naŭa oni povas aĉeti birdeton kun koloro kaj grando laŭ sia plaĉo. Ĉu vi opinias bona ideo de la Parizanoj okazigi sian birdofoiron ĝuste inter du preĝejoj? Ĉar birdoj estas la plej senkulpaĵ estajoj, kiujn la Kreinto povis elpensi. Ili ne mordas, ili ne embuske observadas, ili ne gratas kaj ne batas. Ili nur kantas kaj nentia iom saltetas, saltetiras, trotetas kaj trotetadas supren kaj malsupren. Ili kveras kaj rukulus, kantetadas, kolumbumas, pepas kaj kantas la tutan tagon, senfine mire ĉirkaŭrigardante per siaj okuloj, kvazaŭ ili mem informiĝus pri la kialo de sia ekzistado. Tial mi ĉiam miras, kial sankta Francisko fakte predikis por la birdoj. Mi kredas, ke li faris tion por fari plezuron al postaj pentristoj de preĝejoj, kaj ke la tuta prediko, ĝuste dirite, estis nenio alia ol simpla improviziata babilado, en muzika kadro de la aŭskultantoj mem.

La plej rimarkinda birdo de la tuta foiro estas verda papago kun helruĝa kapo; ĝi apartenas al kolera aspektanta virineto, kiu rifuzas vendi ĝin, sed tamen estas preta igi ĝin montri siajn artaĵojn por la sumo de tri frankoj. Si faras tion en malafabla maniero kvazaŭ pensante en sia koro, ke vi fakte ne valoras tion. La artaj lertaĵoj estas tri. En la unua la besto ekstaras sur la kapo kun siaj kruroj supren. Kiam vi resaniĝis post la ŝoko, sekvas la dua akrobataĵo: la besto faras tri riverencojn kaj diras ĉiufoje: „merci” Tio estas danko por ĉiu el la tri frankoj aparte. Fine sekvas la tria lertaĵo: la birdo fiere rektigas, plengorge kriante:

„Napoléon Bonaparte !!! Vive l'empereur !!!” Jen la lasta Bonapartano, kiun Francujo posedas. Tamen ĉi tion ĝi faras nur, kiam oni proponas al ĝi kandopecon. Mi iomete seniluziigis pro tio, sed post kelke da pripensado mi komprenis, ke la besto estas samnatura en tio kiel la plej multaj adeptoj de politikaj partioj.

Kiom da birdoj ĉeestis? Mia amiko, kiu estas policano sur tiu malgranda foirejo kaj kiu en la daŭro de la jaro fariĝis klera ornitologo, taksis la nombron je pli ol cent mil. Ili havas valoron de po 20 frankoj por simplaj grizaj saltetbestetoj, kiuj grandnombre sidas babilantaj unu apud la alia sur lignaj bastonetoj, ĝis po 1200 frankoj por diverskolora sorĉa pilko, kiu sidas aparte en kaĝeto, nenion dirante. Tre silentemaj estas ankaŭ la najtingaloj. Ili eĉ ne movas sin. Kun oblikve klinita kapo, ili melankolie rigardas la prezoslipon, fiksitan sur la dekstra kruro, kaj revas pri la mallumaj arbaroj, de kie ili originas kaj kie ili inspiras sennombrajn mezbonajn poetojn al sennombraj mezkvalitaj versaĵoj. Ili eble pensas pri tiuj versaĵoj kaj tial estas tiom deprimitaj. Ankaŭ povas esti, ke ili opinias sin tro malalte taksitaj. Sed la vera kialo de ilia malgajeco estas verŝajne jena: ili estas najtingaloj. Ĉar al najtingalo konvenas sidi en la krepusko sur arbobrango, malantaŭ benko, kie du geomantoj ĉirkaŭbrakas unu la alian silente aŭskultante la dolĉan, sed iom post iom pli-laŭtigantan kanton, kiu komenciĝis malantaŭ ilia dorso. Dimanĉmatene, en la brilanta suno, kun prezo de nur 600 frankoj sur la dekstra kruro, oni sentas sin iom senarmita, seniluziigita.

Sed cetere, kiom da kverado sur ĉi tiu placeto! Kaj rimarkinde ĉe tio estas, ke la delikata kantetado el tiuj miloj da birdogorĝetoj ne kreskas ĝis unu laŭtega krio, same kiel la kriadado de miloj da homoj elkreskas ĝis unu muĝo, sed ke ĝi restas ekstreme nuanca pepado, en kiu ĉiu birdovoĉeto konservas siajn proprajn lokon kaj valoron. Neniu el tiuj bestejoj perdas sian personecon aŭ sorbiĝas de la mincan-

ta fenomeno, kiun oni nomas amaso.

Kaj nun mi komunikos al vi ankoraŭ unu malkovron pri la Pariza birdofoiro, malkovron, kiu eble ŝajnas al vi ne grava, sed kiu jetis min en oceanon da meditado. Ĝi estas jena: inter la alt-prezaj kupraj kaĝoj kaj zorge krado-provizitaj ĉambretoj, ĉirkaŭsaltetas sur la pavimo nombro da grizaj, negravaj birdetoj, kiujn oni nomas „paseroj”. Ili ne havas prezoslipon sur sia dekstra kruro. Ili ne estas, kiel iliaj maloftaj tropikaj gefratoj, koloritaj orangflavaj kaj indigobluaj. Ili ne povas kanti, nek krii „vive l'empereur!” Sed kiam mi kunfrapis la manojn kaj ili rapidis supren en turniganta nuboj, malkovrigis al mi la sola eco kiun ili certe posedas: LIBERON.

Kaj postrigardante ilin, altaj en la blua aero, mi pensis pri la vorto de la evangelio: „Ĉar ĉiu, kiu sin altigas, estos humiligata, kaj kiu sin humiligas, tiu estos altigata.”

El: „BUI TELINGEN” de Godfried Bomans trad. J. Rooker.

Gevraagd: gebruikte ex. „Het Esperanto A-examen” van M. de Waard. Aanb. aan mej. B. Leopold, S. de Landasstraat 97, Arnhem.

en vooral met de beperkte hoeveelheid vrije tijd van de bestuursleden maar een bescheiden resultaat bereikt kan worden, vervult ANSE toch reeds een niet onbelangrijke functie. Deze bestaat in de eerste plaats hierin dat op de betekenis van het Esperanto gewezen wordt in die kringen, die in de samenleving de toon aangeven en de leiding hebben. Zien deze kringen eenmaal het grote nuttig effect in dat bij invoering van het Esperanto in het internationale leven te verkrijgen is, dan kan invoering bij het onderwijs niet uitblijven.

drs G. F. Makkink, voorz. ANSE 1)

1) Het sekretariaat is gevestigd: Groenesteinstraat 99, Den Haag.